Registered at G.P.O., Melbourne, for transmission by Post as a newspaper.

15 MAR 1927 ... OF VICTORIA


# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.*

Redakcio-Administracio :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 81 (Seventh Year) Melburno *(Melbourne)*, Australio. 10 marto 1927


## SPIRIT OF CHINA.

—

**British Warships A Menace.**

—

**Outspoken Doctor.**

—

At two hours' notice from the British Consul, on January 9, Dr. F. J. Williams, medical superintendent of the London Missionary Men's Hospital, about a mile outside the British concession at Hangchow, had to leave his home with his wife and child.

They arrived in Sydney yesterday aboard the Arafura.

Dr. Williams spoke, in an interview, of what he termed "the new spirit of nationhood among the Chinese people." "I felt that the presence of foreign and British military and naval forces was a menace to my wife, my child, and myself," he said.

"Dr. and Mrs. Williams had come to the conclusion just before they received the order to leave that affairs in the concession had quietened down and both they and the Chinese staff of the hospital were greatly surprised when they were informed that their departure was necessary, as a precautionary measure.

"I was in bed, ill," he continued, "so a friend came in and packed our clothes, and I was taken in an ambulance to the boat. We were able to bring away only a few personal possessions, and don't know the least what has happened to our home, which we had newly furnished.

Dr. Williams said that, although he had been in China only two years, he had studied the position during that time, and talked with people who had been there up to 40 years. "I feel very strongly," he stated, "that the present trouble has at its base the new spirit of nationhood that has arisen among the Chinese people. They resent very strongly the existence of what are known as 'unequal treaties' with foreign nations, the presence of foreign settlements and concessions, and extra territoriality. They resent most bitterly the presence of foreign naval and military forces in China, and the action of certain foreign business firms in supplying arms and ammunition to the various sections among the Chinese, and by so doing prolonging the state of civil war; also their supplying them to brigands, thus promoting lawlessness.

"The Chinese greatly resent the attitude of superiority taken by many foreigners, and, if on no higher grounds than their own interests, foreigners would be well advised to treat the Chinese on a basis of equality.

**Factory Conditions.**

Dr. Williams added that he had not made a special study of factory conditions, but it was a matter of common knowledge among the general public that these conditions, both in Chinese and foreign factories, were, generally speaking, appalling, though of course, there were some humane and far-seeing employers who had

greatly improved the conditions under which their employees worked and lived.

"I hope to return as soon as possible to my work," he continued, "but I would feel our own lives and what I possess would be much more secure if no foreign military and naval forces were there. Instead of the coming of the foreign warships giving us a sense of security, it gave us a sense of unrest."

—Daily Telegraph, Sydney, 22/2/27.

## SYDNEY ACTIVITIES.

An attractive syllabus covering the period February-July 1927, has been received by us from the Sydney Esperanto Society, part of which we reprint below as a guide to intending visitors and a source of information to other groups:—

Mar. 17, "Esperanto in China, Mr I. Serisheff; Mar. 24, Proverbs in Esperanto, Members; Mar. 31, Social Evening.

April 7, "Limitations of English," Mr. D. Healy; April 13, Gems of Esperanto Literature, Members; April 21, "The Art of Rhetoric," Mr. V. Rutland; April 28, Dance.

May 5, "Intercommunication—Ancient and Modern," Mr. A. Jamieson; Mar. 13, Mock Trial, Selected Members; Mar. 19, "Legends of the Far East," Mr. E. A. Pryke; Mar. 26, Amusement Evening.

June 2, "More Esperanto-Ido Comparisons," Mr. F. T. Simon; June 9, Play Reading, Members; June 16, "Siberia" (Illustrated), Mr. I. Serisheff; June 23, Jazz Night; June 30, Annual Meeting.

July 7, "This World in General," Mr. J. N. Edmonds; July 14, "Adventures, True and . . . . " Members; July 21, Subject to be Announced, Mr. L. E. Pfahl; July 28, Latest Esperanto Publications.

## DONATIONS TO SUDA KRUCO APPEAL.

F-ino B. K. Blyth, 10/-; Melbourne Esperanto Society, £2/5/9; f-ino M. C. Trundle, 3/-; f-ino Maud Helm, 5/6; s-ro B. J. Dooley, 3/-; s-ro H. Byatt, 10/-; s-ro G. Gordon, 5/-; f-ino Trewin, 5/-; Anonima, 5/6.

## PRINCE CHARLES OF SWEDEN AND ESPERANTO.

In connection with the marriage of the Princess Astrid with Prince Leopold of Belgium, it is stated that the latter is honorary president of the Belgian Esperantists League, while his brother-in-law, Prince Charles of Sweden, has just passed an examination in Esperanto at Stockholm, in which he has obtained a certificate of capacity.

—I.E.S.

### Sibford Friends' School, Banbury.

In The Friend (12 Nov.) is a Time Table of studies at this school, from which it appears that in the first year there is a daily half-hour of Esperanto, in the second year two half-hours weekly, and in the third year one half-hour weekly. The Headmaster quotes among "Special Features" the introduction of Esperanto and the omission of Latin. He writes: "Esperanto as an educational subject is becoming more appreciated. Its disciplinary value is little, if at all, less than that of Latin; its principles of word formation render it attractive to mathematical minds; its influence on international relations is rapidly growing; and its helpfulness in the study of the Mother tongue is clearly proved."

—El British Esperantist.

## OFFICIAL RECOGNITION OF ESPERANTO IN ENGLAND.

The English Board of Education has, as in previous years, made grants to the classes in Esperanto, which are included in the programme of evening classes for adults in a number of towns. These classes are subject to official regulation and inspection. There are at present 15 classes in London alone under the auspices of the London County Council and the Worker's Educational Association.

## TECHNICAL VOCABULARIES IN ESPERANTO.

The Paris technical publishers, Chiron, have just issued the first volume of a series of technical vocabularies in five languages including Esperanto.

—I.E.S.

HAROLD PUDNEY Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per posto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE

## RECENZEJO.

—

BARBARAJ PROZAĴOJ, Prudenci Bertrana. El la Kataluna originalo tradukis Jaume Grau Casas. Rm. 1.60 Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

En antaŭparolo la tradukinto tre laŭdas la verkiston kaj diras, ke se li skribis en lingvo pli vaste konata ol estas la Kataluna, lia nomo estus internacie konata. Li ankaŭ diras ke "Josafat" kaj "Barbaraj Prozaĵoj" estas liaj ĉefaj verkoj. Povas esti, ke ĉi tiu diro estas prava, sed amo al la patra lingvo ŝajne malakrigis la juĝon de la tradukinto, kiam li eleklis ĉi tiujn verkojn por la internaciaro. La krudeco kaj bestaco de "Josafat" estas tiaj, ke eĉ en ĉi tiu tempo, kiam la ordinara leganto ne estas ĝeneculo, la nepra ento dum legado de la novelo estas venia alia ol naŭzo. La "Prozaĵoj" estas nomataj "Barbaraj," ĉar ili temas pri la vivo disvolviĝinta en plena naturo. Fakte, ili estas traktatoj, kaj pro ilia peza stilo kaj la videbla peno de la verkisto skribi epopeon pri tre ordinaraj temoj ili estas, almenaŭ en la traduko, ne tralegeblaj. Preterlasante la ĉapitrojn, kiuj priskribas la malĉastaĵojn de "Josafat," la libro taŭgas al tiu, kiu plej volonte luktos kontraŭ malfacilaĵojn por la nura kontento, kiu venas post ilia venko. (C.W.B.)

ANO de L'RINGLUDO, Dinko Šimunoviĉ. El la Kroata originalo tradukis Fran Janjiĉ. Rm. 1.60. F. Hirt & Sohn, Leipzig.

Per ĉi tiu libreto ni konatiĝas kun la Kroata nuntempa verkisto Ŝimunoviĉ, kiu priskribas landon, popolon kaj morojn kaj montras, ke, en tiu lando, la vestoj, la ludoj kaj la vivmanieroj de la loĝantoj malmulte ŝanĝiĝis dum la pasintaj tricent jaroj. La temo de la libro estas amo de patro kaj filo por la sama junulino. Bonaj estas la priskriboj de la lerteco de la patro en la ringludo, kiu estas tre simila al la Angla. "Tilting the Ring," — ludo en kiuj rajdantoj, per lancoj celadas trafi moviĝantan objekton. La frenezeco de la filo post kiam la junulino montras ŝian preferon al la patro estas korŝira epizodo. La rakonto, kvankam iom malgaja, tenas la atenton de la leganto. Gramatikaj kaj preseraroj estas malmultaj. Sur paĝo 72 la vorto "obstuze" devas esti "obtuze" kaj sur paĝo 10 "Ŝi estas du jarojn pli aĝa . . . . " estas neeleganta. (C.W.B.)

OFICIALA KLASIKA LIBRO de Esperanto. Itala, Hispana kaj Portugala partoj. Prezo fr. fk. 3.60, sendkosto plie. Esperantista Centra Librejo, 51 Rue de Clichy, Paris.

Tiu ĉi broŝuro estas en tri partoj, la unua enhavas la italian, hispanan kaj portugalan zorge korektitajn tradukojn de ĉiuj nunaj oficialaj radikoj, esceptante tiujn, kiuj estas sufiĉe internaciaj por ne bezoni tradukon. La dua parto enhavas la internaciajn radikojn, kiuj, eĉ estante netradukitaj, estas ĝenerale kompreneblaj por eŭrop-lingvanoj. La tria parto enhavas la Esperantlingvan difinon de la netradukitaj radikoj, kiuj ne troviĝas en la vortaro de Kabe. Aldone estas listo de fundamentaj vortoj kun la sufikso —um kaj listo de la ĉefaj landnomoj.

"Gvidfolioj" de Geneve, Stettin, Dobŝina, Thiers, Deal kaj Bratislava; oni povas ricevi senpage skribante al Turisma Servo de U.E.A., Geneva.

## GAZETOJ RICEVITAJ.

—

British Esperantist, 262; Belga Esperantisto, 10-11; Bulteno de Internacia Scienca Asocio, 5; Esperanto, 317; Esperanto-Anzeiger, 9, 1; Espero Katolika, 26; Fluganta Skribilo, 45; Heroldo de Esperanto, 63, 64, 1; Holanda Esperanto-Pioniro, 14, 15; Internacia Esperanto-Servo, 12; Internacia Medicina Revuo, 1; Kolektanto, 5; La Orienta Revuo, 13, 1; La Progreso, 10; Oomoto, 22-23; Svenska Esperanto, 12.

## RAKONTA DE MINISTO.

—

"Kompreneble, vi ĉiuj ridos," diris la ministo maldolĉe. "Homoj aŭskultantaj la rakonton pri Joe Capper (elp. Ĝo Kep'r) ĉiam ridas diraĉante, ke ĝi estas nur propagandaĵo por la Minista Federacio k.t.p. Tamen tio estas por mi indiferenta. Mi donas ĝin, kiel evangelian veron, kaj vi ridu laŭvole. Jen kiel la afero okazis.

Joe Capper jam laboradis preskaŭ monaton, havante kiel helpanton unu bubon nomitan Tomĉjo Owens, kiam fariĝis la akcidento, kiu devigis ilin esti kunuloj en kavo dum dek du tagoj sen aŭ lumo aŭ manĝo. Granda falo de roko malantaŭ ili elbaris la vojon returne, entombigante la viron kaj la knabon kun nigraj pensoj kiel iliaj solaj kunuloj.

La patrino de la juna Tomĉjo, aŭdinte pri la malfeliĉo, preskaŭ freneziĝis, ĉar Tomĉjo estis ŝia sola ido: plue, ŝi estis speco de vidvino, per tio, ke la edzo, ĵus antaŭ ol la unuenaskito aperis en la mondo decidis forkuri pro edzina trobabilado. Vi ja scias, kiel la virinoj kondutas en tiaj okazoj. Ŝi sufiĉe laŭte priploris la baton kaj ricevis kondolencojn de ĉiuj. Ne malmultaj eltordis por la kompatindulino iometon el sia nesufiĉa monhavo, kaj pli ol unu penis kuraĝigi ŝin, dirante, ke Tomĉjo nepre estos savita, kaj, kvankam li enfermiĝis subtere, li ne povis elekti pli bonan viron, ol Joe Capper, kiel kunulon. Mi esperas, ke vi komprenas. Ĉiu ja scias, ke Joe estas tia bonega laboristo, kian oni malofte trovas, kaj pli saĝa, ol ordinarulo en siaj aferoj, ĉu faritaj, ĉu diritaj. Nun vorto pri Joe mem. Estas strange, ke neniu sciis multon pri li. Tre maljuna homo li certe ne estis, tial iom ridetinda li aspektis pro sia portado de barbo. Jen la tuto direbla pri Joe, ekster tio, ke li estis lertega ministo, kulturis vizaĝharojn por sin amuzi, kaj loĝis kun la familio Jones (elp. Ĝonz), laktvendistoj en apuda vilaĝo. H'm, preskaŭ mi forgesas vin informi, ke li ŝatis la junan Tomĉjon sammaniere, kiel la knabinoj ŝatas la muziko-komediojn, kaj tiagrade, ke iliaj nomoj aŭdiĝis en la drinkejo Ruĝa Leono pli ofte en unu nokto, ol tiu de Steve Donoghue (elp. Stiv Donohu, fama Ĵokeo en la daŭro de tuta semajno. Mi tute ne scias, kion amikigan Joe povis vidi en bubo ĵus dekokjara, simila al vivanta skeleto kaj havanta okulparon trograndan por sia vizaĝa mallarĝo.

Tamen—negrave, ĉu ili estis amikoj, ĉu malaj—sube ili malliberiĝis, devigaj kunuloj. Duono de la minejanoj laboregis envice, kriante kiel frenezuloj, dum ili dispecigis furioze la solidan karbomuron inter ili kaj la enfermitoj. Tratranĉi ĝin per pioĉoj estis la ununura ŝanco por savi ilin, kaj mi volus demandi, ĉu iu el vi uloj okaze renkontis diablon vagantan el la Infero? Nu, ministo hakeganta por savi kamaradon ĝuste similas tion. Jen ili, la fortaj elektitoj de la minejo, ŝvite frakasantaj kaj tiregantaj, same furioze kiel tigroj—sed ve: dek du tagoj estas tre longa tempo ĉe homoj restantaj senmanĝe, senakve, kaj la favorato je veto estis Joe Capper. "Joe estas forta kaj nekonfuziĝema homo," pensis la mineja administranto: "li tenos la vivon, sed la alia estas timeble tro—tro malfortika."

Tio estis la ĝenerala opinio, kaj kiel kutime ĝi fine trafis la orelojn de la vidvino Owens. "Dio estas pli kruela kontraŭ iuj, ol aliaj," ŝi vee plendis. "Li forprenis de mi la edzon, aŭ pliĝuste diri Li igis lin forlasi min, kaj nun volas senigi min je la sola filo. Ĉiam la malriĉaj kaj senhelpaj devas suferadi. Joe Capper sukcesos travivi, ĉar li havas neniun esperantan revidi lin: mia filo mortos, ĉar li estas mia sola helpanto. Ho la kruela Dio." Tiel ŝi daŭre babilis, demandante ĉiun, kion ŝi faris por meriti tiun traktadon, sed neniu povis klarigi tional ŝi ĝis poste per diro, ke la propra lango estas ŝia kulpiganto.

Je la dek-dua tago ili finhakis trairejon. Nu, mi ne volas aperigi la aferon pli nigreca, ol ĝi efektive estis, ĉar por diri la nudan veron estas mia ĉiama celo, kaj ĝin mi foje jam trovis sufiĉe stranga, sed devige dirota estas, ke la pioĉistoj trafis ilin—unu vivantan kaj unu mortintan. La mortinto estis Joe Capper, kaj la kialo por tio estis videblega. Li estis entranĉinta vundon en sian manradikon per akra rando de la propra manĝvazo, kaj la bubo ŝajne, estante komata, ne sciis, kion li trinkas.

La stranga parto de la rakonto eble restus daŭre kaŝita, se ne estus, ke la vidvina lango denove ekklakadis. Ŝi komencis iradi de domo al domo, dirante al najbaroj, kiamaniere la bona Dio respondis ŝiajn preĝpetojn. Eĉ ŝi rakontis ĝin ĉe la

temanĝo de la Societo de Patrinoj. Oni ne povis reteni ŝin, kaj nature multaj enuis je troaŭdado. La min- eja administranto estis unu tediĝinto. Tial li vizitis ŝin unu nokton, port- ente ion kovritan per papero. Post invito eniri la domon, li demandis. "Ĉu vi scias, kiu estis tiu Joe Cap- per?" Ŝi tute ne havis ian informon pri la mortinto. "Nu, vidu ĉi tion," diris. La montraĵo estis per uzado difektita manĝvazo, de kiu li for- prenis la kovrilon. "Ĝi estas lia man- ĝvazo," ŝi diris sciiĝinte, 'kaj tre uzita—kaj malpura." "Nu, tiu mal- puraĵo savis la vivon al via filo," re- spondis la administranto. "Vi nepre devas legi komunikon engratitan sur la fermoplato. Ĝi estas skribo de mor- tanto—al vi." Post ioma peno ŝi kon- fesis nekapablon ĝin deĉifri "Aŭs- kultu do. Ne estas multo legota," respondis helpe la viro, kiu tiam voĉ- legis por ŝi la jenon.—"Diru al Tomĉjo, ke ĉi tio estas ĉio, kion povas fari por li lia patro. Joe Owens."

Jes, ĝi certe stranga afero estis, tamen per ĝi klariĝis la korinklino de Joe al la bubo. Kompreneble, iom anime fortiĝinte, la vidvino denove lendis pri la krueleco de Dio, pro fo, ke Li permorte forprenis al ŝi la edzon tuje, kiam ŝi lin trovis. Estus dece, se ŝi tenus fermita la buŝon, kaj per tio retenus sian ĉiaman "Dio faris tion kaj ne faras ĉi tion," k.t.p. Miaopinie Joe estus farinta la samon por kiu ajn. Patrino-Naturo tiaman- iere konsistigas la ministon.

John Frew, en "The Saturday Westminster."

Trad. ROBO, Melbourne.

## ANONCO.

—

Dr. Florencio Cartana, Almera, 34, Barcelona-Horta, Hispanujo; volas korespondi kun fraŭloj aŭ fraŭlinoj, kaj interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn.

## KRONIKO.

—

Denove ekfloras intereso por Esperanto en Aleksandrio, Kairo, ktp. Ĵurnaloj ĝenerale estas favoraj, precipe la plej grava arablingva.

PORT SAID. 1 Januaro fondiĝis Esperanto-Grupo de Port Said. Prez: M. Mustafa; Sek: N. Anuar; Kas: Iskander Hanna. Du kursoj, por komencantoj kaj progresintoj, ĉiu dufoje semajne ĉe s-ro Fadel.

Oni havas Libron de Vizitantoj kaj forte petas ke neniu trapasanta samideano manku enskribi sian nomon. Se eble, antaŭavizu la alvenon al s-ro Mustafa, c/o Egyptian State Telegraphs; tiam samideano akceptos vin surŝipe aŭ ĉe la stacidomo. Nia Prezidanto ĉiam estas trovebla ĉe la Egipta Ŝtata Telegrafejo. dudek metrojn de la doganejo.

TANTA.—S-ino Nikolaides fervore propagandas, precipe inter grekaj kaj egiptoj,en tiu ĉi grava urbo en la Delto de la Nilo.

MELBURNO, Vic.—En la mezo de februaro la estiminda prezidanto de la Suda Aŭstralia grupo, sinjoro Waterman, faris viziton al nia societo. Li bone parolis pri la stato de la movado en S. Aŭst. kaj la progreso de la tiea grupo.. Li montris grandan entuziasmon per siaj bondeziroj por la plivastigo de la movado. Li afable partoprenis en la traduka rondo, kiu estis la programero por tiu nokto, kaj estas bedaŭrinde ke li ne povas resti pli longe en Melburno por esti pli ofta ĉeestanto ĉe la kunvenoj.—

La stariĝo de grupo ĉe la "Domestics Arts School" Footscray, estas rezultato de propaganda parolado farita de fraŭlino N. Byatt, kiu instruos la lernantinojn en la lingvo.

Alia parolado pri Esperanto estis brodkastita de 3LO. La parolinto estis sinjoro R. Rawson, kun la helpo de fraŭlineto S. Dumbrell.

THE READING OF

# ESPERANTO LITERATURE

is essential in order to obtain clear expression and good style.

WE HAVE AN EXTENSIVE STOCK OF THE LATEST LITERATURE BY THE BEST AUTHORS.

Pro Iŝtar (Luyken), La Faraono (Kabe), Karmen (Merimee), Lilio (Synotte), The Complete Bible.

Send stamp for full price list. Include postage when ordering, 1d. for each 1/-.

MELBOURNE ESPERANTO SOCIETY, Box 731f, ELIZABETH ST. P.O., MELBOURNE.

SYDNEY. — Elstaranta okazintaĵo dum pasinta monato por ĉi-tieaj Esperantistoj estis la samtempa vizito de du agemaj propagandistoj, D-ro Fred. J. Williams kaj S-ro Maurice Hyde.

Unua venis de Ĥinujo, kion li devis forlasi pro la malfeliĉaj cirkonstancoj tie, kaj la alia bonkonatulo por keltaga vizito de Melburno.

"Sydney Morning Herald" kaj "Daily Telegraph" (la plej gravaj matenĵurnaloj) enpresis longan intervjuon kun akompanata fotografaĵo de D-ro Williams donante impresojn kaj opiniojn pri la nuna maltrankvila stato.

Membroj de la Sydney-a Esperanto-Societo profitis renkonti ambaŭ kaj ĉe socia vespero la 24a Februaro, S-ro Hyde multe interesigis anojn per mallonga parolado pri uzado de Esperanto dum sia antaŭnelonga mondvojaĝo. D-ro Wiliams bedaŭrinde ne povis ĉeesti pro familia malsano.

Tiaj okazoj donas al Aŭstraliaj Esperantistoj kaj Esperantemuloj ne nur fortan konvinkon pri la viveco de nia kara lingvo, sed impresas ilin pri la utilo de vera mondlingvo, kies interna celo estas fari la mondon iom pli bona.

## PRI SPECIEMENAJ KOPIOJ.

Preskaŭ ĉiu alveno de la poŝto de la eksterlando portas al ni petojn por senpaga specimeno de La Suda Kruco. Ni tre ŝatus kontentigi tiujn petojn, se ni povus tion fari sen malprofito pro la poŝtelspezoj. Ĝis nun tio estis neeble, sed dank'al la respondkuponoj de U.E.A., ĉiu kiu volas, nun povas pagi por provnumeron de La Suda Kruco sendante 50 centiman kuponon por unu numero aŭ unu frankan kuponon por la tri plej freŝdataj ekzempleroj.

## NEW WIRELESS BROADCASTINGS IN ESPERANTO.

Following the example of other European stations, the Falun station (Sweden) has admitted Esperanto to its programme. The first broadcasting an introductory lecture, took place on 22nd October.

A new course has also been commenced at the Munich station, which is re-transmitted at the same time by the Nuremberg station. On 9th and 10th August, 1926, the JOCK station at Nagoja (Japan) broadcast two lectures on Esperanto in Japanese.
—I.E.S.

## HERE AND THERE.

Prince Carl, of Sweden, brother of Princess Astrid who recently married the Crown Prince of Belgium, has succeeded in gaining the diploma of the Swedish Esperanto Institute.

The Edinburgh Congress was a success. The Internacia Centra Komitato received about £200. Ten pounds is earmarked for propaganda in Great Britain and £21 is retained for contingencies.

Towards the end of last year an Esperanto group was formed at the Liverpool University. Professor W. E. Collinson is the President and Professors W. J. Dakin and Rice are Vice Presidents. One of the aims is to correspond with students of foreign universities and it is hoped that Esperanto students in Universities of other lands will work with those of Liverpool to their own mutual advantage and for the good of the Esperanto movement.

The Fourteenth Japanese Congress was held at Tokio from 24-26 September. There was an attendance of about 250 and the public propaganda meeting attracted 1500 persons. The congress considered the formation of a Japanese Esperanto Literature Association, the aim of which would be to translate the masterpieces of Japanese literature. The Medical section passed a resolution regretting that the Pacific Science congress had not included as one of the languages to be used thereat. The Tokio Station, (J.O.A.K.) broadcast a "talk" on Esperanto by Professor Dr. Seiho Niŝi.

"Literatura Mondo" has ceased publication.

"Pitman's Journal," 20 Nov., quotes a recent editorial in Nature as follows: "If the world were governed by reason (which it is not and probably never will be), an international auxiliary language would have been adopted many years ago. . . . It remains to be seen how far civilization will succeed in promoting the dictates of reason against the opposition of instinctive tendencies and age-long prejudices." P.J. comments: "The inconveniences of existing linguistic arrangements are being felt as they never were before; and as the consciousness of these inconveniences increases, the voice of reason may begin to make itself heard."

The Eleventh National Peace Congress, held at Valence (France) at its meeting on 24th September 1926, adopted the following resolution in favour of Esperanto:

Whereas the Universal Peace Congress at Lucerne in 1905 and at Paris in 1925 declared themselves in favour of the auxiliary language Esperanto;

And whereas this auxiliary language is now adopted by most of the great universal and official organisations;

And whereas, for the masses who are likely to remain at the elementary stage of education. Esperanto if taught as a second language and studied as a logical mechanism, might become a marvellous instrument of culture conducive, on the one hand, to a more perfect acqaintance with the mother tongue and, on the other hand, to converse between different peoples;

The Eleventh National Peace Congress:

1. Begs all teachers and professors to endeavour to learn this language, the acquisition of which is relatively rapid and easy, and urges them to make the utmost effort, by every means, both in the towns and in the country, to teach Esperanto, outside of school hours, to children of both sexes, commencing at the earliest age.

2. The Congress urges the public authorities to consider the best means of securing the introduction of this second language into the syllabus of elementary education in all its grades.

—I.E.S.

## ESPERANTO AND THE POLICE.

### Germany.

The Prussian Minister of the Interior, as the result of an enquiry, has issued an order (16.IX.26, II M 107, No. 6) that all police constables having a sufficient command of a foreign language or of Esperanto shall wear a special distinguishing badge when on duty.

### Belgium.

The first class for members of the police force in Antwerp was held in 1911. Since 1924, regular classes have been organised at the police School. It is worthy of remark that already more than 60 officers and constables speak Esperanto.

In view of the XX. Universal Esperanto Congress to be held in Antwerp in 1928 further classes are about to commence.

—I.E.S.

## THE UNION OF INTERNATIONAL ASSOCIATIONS AND ESPERANTO.

The interest taken by the Union of International Associations at Brussels in Esperanto indicates various possible applications of that language in international matters.

(1) The Union employs Esperanto in its correspondence and at its congresses.

(2) Its world's museum has an Esperanto hall.

(3) Its universal bibliographical repertory contains an Esperanto section.

(4) Esperanto figures, with a division of its own, in the decimal classification.

(5) An abbreviated manual of the decimal classification has appeared in this universal language. A ployglot edition including Esperanto is in preparation.

(6) An Esperanto section has been created in the International Bibliographie.

(7) The documentary encyclopaedia contains a large number of files relating to the language.

(8) In the Museum of the Press, which comprises 80,000 specimens of newspapers, Esperanto is represented.

The use of Esperanto in still other sections of the Union is contemplated.

—I.E.S.

## ESPERANTO AT INTERNATIONAL CONGRESSES.

The International Congress of the Federation of Anti-alcoholic Societies of Railway employers unanimously adopted the following resolution: (Paris. 25 October):

The Congress being convinced that mutual comprehension is of capital importance in an international congress, and recognising the difficulties experienced by societies in certain countries in finding delegates acquainted with the language habitually employed at the congresses,

Is of opinion that a common auxiliary language would be of the greatest value and desires the Secretary to prepare for the next Congress a report on the results obtained in this direction.

The delegate of the Finnish railwaymen at this congress could speak no other foreign language but Esperanto.

—I.E.S.

## SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS.

Owing to the Royal visit to Hobart having been fixed for the Easter holidays, it has been decided to cancel the holding of the Congress at Hobart in 1927.

## THE GREEK GOVERNMENT AND ESPERANTO.

The Greek Government has recently authorised the introduction of Esperanto in Institutes for training of elementary and secondary school teachers. At the same time Dr. Anacroon Stamatiadis, the pioneer of the Esperanto movement in Greece, has been appointed professor for this courses to be organised (No. 60.038/29.10.)

The following is the translation of the circular:

Hellenic Republic Minister of Worship and Public Instruction. No. 57. 363.

Athens, 28 October 1926.

To the Directors of the "Maraslion" Teachers Training Institute; To the Institutes for the training of elementary teachers; To the Institutes for the training of secondary school teachers.

You are doubtless aware of the diffusion of the international auxiliary language Esperanto. Almost all European states have now introduced the teaching of this language, either as a compulsory or optional subject.

Believing that its study might be equally useful for the Greek people, both for their own culture and for their intercourse with other nations, we agree to your authorising the teaching of said language to all pupils desiring to follow the Esperanto courses.—(Signed): G. Tidachos, Minister. —I.E.S.

## NEW ESPERANTO BROADCASTINGS.

A new course commenced at the Ekaterinoslav station (Siberia) on 30 November. The Krasnodar station broadcasts reports in Esperanto every Wednesday. Lectures are announced from the stations at Dublin and Cleveland (Ohio, U.S.A.),, where a course has just concluded. On 15th December the Breslau station broadcast an entire programme in Esperanto. The amateur station 8BX at Orly (Seine) broadcasts items in this language. The Wireless Directorate at Pargue, which had previously refused to introduce Esperanto, has agreed to broadcast a course of lessons in the language from its station at Brunn.

—I.E.S.

**Melburna Esperanto-Societo**, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendredo vespere, je la oka horo.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun ĵaudon de 7.45—10 ptm. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

**Hobarta Esperanta Grupo.** Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str:, ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str:, Hobart.

**Persista Grupo**, Melburno. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas. Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

*Cole's Book Arcade, Melbourne.*

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

—— Send for ——

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, 323-325 Bourke Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.